

Władysław Syrokomla,  
 Plugisto al alaŭdo

*tradukita de Salomon Grenkamp-Kornfeld*

Frue alaŭdo kantas,  
 mi jam ĉe laboro;  
 nin kune ĉe okupo  
 vidas la aŭroro.  
 Di' helpu, alaŭdeto,  
 donu la esperon;  
 ne por mi nur, sed por vi  
 semas mi greneron.

Feliĉa vi alaŭdo  
 multon ne bezonas;  
 sufiĉe, se vi florojn  
 kiel ĉielon konas.  
 Ĉe ni ne, alaŭdeto,  
 sama tio estas;  
 nin minacas malĝojo,  
 ĉe vi ĝojo restas.

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

*Traduko de la Pola poemo "Oracz do skowronka" de WŁADYSŁAW SYROKOMLA (civila nomo: Ludwik W. F. Kondratowicz, \*1823-09-29 – †1862-09-15) en Esperanton de SALOMON GRENKAMP-KORNFELD (civila nomo: Salomon Kornfeld, \*1896 – †1943).*

*Arg-1037-2107 (2014-06-02 07:32:36)*

*Pri la tradukinto vidu ankaŭ: <http://www.librarything.com/work/14377292> kaj <http://www.librarything.com/author/grenkampkornfelds>. Vidu ankaŭ: <http://d-nb.info/gnd/143562940/about/html> kaj <http://esperanto.net/literaturo/autor/kornfeld.html>. Alia poemo de la aŭtoro troviĝas en [http://eo.wikisource.org/wiki/Deziro\\_\(Grenkamp\)](http://eo.wikisource.org/wiki/Deziro_(Grenkamp)) Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio, (sur la paĝoj 44 kaj 49). La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann.*